

Leterujo, 3-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 528, 1973.11.21 & 24

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Antaŭ du semajnoj ni malfermis nian leterujon por respondi al la afablaj salutoj de niaj skribemaj geaŭdantoj. Ni tiam menciis, ke alvenis poŝtkartoj kaj leteroj el 20 landoj, tio estas el Aŭstralio, Aŭstrio, Brazilo, Britio, Ĉeĥoslovakio, Finnlando, Germanioj okcidenta kaj orienta, Hungario, Italio, Jugoslavio, Kanado, Kubo, Nederlando, Norvegio, Nov-Zelando, Pollando, Svedio, Svislando kaj Usono.

A.- Laŭ la alfabeto vico de la landoj kaj de la skribintoj ni komencis babiladon kun nia aŭdantaro. Ni alvenis al Francio, kie ni jam salutis multajn geaŭdantojn.

Cl.- Ni ankoraŭ salutas sinjoron A. Legret en Vire, Calvados, sinjoron René Lemaire en Lyon, kiu ŝatas nian dialogadon inter vira kaj virina voĉoj.

A.- Sinjoro René Llech-Walter, la sekretario de Kultura Centro en Perpignan, faras alvokon favore al la Kulturdomo Grésillon, kiun ni opinias subteninda. Jen tiu alvoko :

Cl.- « *La Kultura Asocio de la Kastelo Grésillon alvokis pasintjare la esperantistaron por la konstruado de ĉambrego por prelegoj kaj kursoj. Kun la sumoj ricevitaĵ oni jam povis komenci la laboron. La muroj kaj la plafono estas nun faritaj. Mankas la materialo por mebli la ĉambregon : seĝoj, aŭdvidaj aparatoj, tabloj, tabuloj, kaj tiel plu. La esperantistoj povas direkti siajn donacojn al la kastelo Grésillon.* »

A.- Kiel ĉiuj scias, tiu Kastelo estis aĉetita antaŭ 20 jaroj. Nun ĝi fariĝis unu el la plej viglaj institucioj de nia movado. Povu tiu modernigo alporti pozitivajn rezultojn. Pli da partoprenantoj povos profiti pri la ĉiam allogaj programoj de Grésillon.

Cl.- Ĝuste el tiu kastelo Grésillon alvenis salutoj de 45 geinstruistoj okaze de seminario pedagogia. Tiuj kunsidoj de fakuloj devus iom post iom diskonigi niajn instru-teknikojn, inter ili la aŭdvidajn, pri kies avantaĝoj ni parolos ĉiintre.

A.- Ni salutas sinjoron Marcel Maillot en Héricy, gesinjorojn Edmond Plutniak-Menard en Lievin kaj nian tre fidelan aŭskultanton Gaston Vidal en Chamalières.

Cl.- En Germanio okcidenta ni salutas doktoron Artur Bormann en Reinbeck, sinjorinon Petra Engel en Hamburg, doktoron J. Kondor en Neuwies, kiu estis ĝoja aŭdi la voĉon de sinjoro Reinhard Haupenthal tra la ondoj de la Svisa Radio. Ni citas : « *Via interparolo kun s-ro R. Haupenthal estis vera plezuro por mi, jam mi konas lin persone kaj alte taksas lian lingvan kaj literaturan talenton. Lia parolo estis agrabla, belsona, tute nature fluanta. Dankon pro la ĝuo ! [...]* Lia voĉo estas ege konvena por radioparolado, certe foje ni povos aŭdi lin regule en la germana radio. »

A.- Tion ni ankaŭ esperas. Sinjoro Ludwig Pickel en sia informilo *Pilo-Press*, eldonita en Nürnberg, regule informas pri niaj radio-elsendoj kaj eĉ resumas la prelegojn, kiujn li havis la okazon aŭskulti. Bedaŭrinda malsano interrompis la eldonadon de *Pilo-Press* dum kelkaj monatoj, sed nun ĉio ree glate funkcias. Tio montras la malfortecon de iuj esperanto-institucioj, kiuj tro ofte kaj bedaŭrinde dependas de la sanstato kaj laborkapablo de unuopuloj.

Cl.- Ni salutas sinjoron Bruno Siegert en Fürth, sinjoron Wenzel Weber en Mönchengladbach, sinjoron W. von Waldowski en Berlin.

A.- Tiu programisto partoprenis internacian kunvenon pri komputera lingvistiko okazinta ĉisomere en la universitato de Pisa en Italio. En tiu kongreso li renkontis doktoron Antal Münnich el Budapeŝto, ankaŭ esperantisto. Por nia radio ambaŭ fakuloj pri komputera lingvistiko registris etan intervjuon, kiu diras kial la komputera lingvistiko eble ludos decidigan rolon en la oficialigo de Esperanto. La venontan semajnon ni aŭdigos al vi tiun interesan dokumenton.

Cl.- En Germanio orienta ni salutas sinjoron Franz Tischler en Magdeburg, kiu malgraŭ preskaŭ kompleta blindiĝo tamen provas regule skribi poŝtkartojn por atesti pri sia aŭskultado. Ni ankoraŭ salutas sinjorinon Hella Sauerbrey en Berlin.

A.- En Hungario ni salutas sinjoron Pál Balkányi en Budapeŝto, la membrojn de la Junulara Klubo Promontor en Budapeŝto, inter kiuj troviĝas fidela aŭskultanto, sinjoro Ludoviko aŭ Lajos Niederfriniger.

Cl.- De la nun tradicia renkontiĝo naturamika en Abaliget ni ricevis interesan raporton, el kiu ni citas kelkajn erojn konklude al nia radio-prelego : *«En julio 1973, por la sesa fojo disvolviĝis tiu internacia restado, kiun partoprenis esperantistoj el 10 landoj. Ili migradis en la arbaro, naĝis, boatadis kaj vespere kunvenis en halo de turista domo por rigardi filmojn kaj lumbildojn kaj aŭdi prelegojn. Gajeco ĉiam regadis kaj kulminis ĉe vesperaj ĝojfajroj kun kantado, lardofritado, vingustumado. Per aŭtobuso estis vizititaj termal-banejoj kaj fortikaĵoj. Samtempe kaj paralele disvolviĝis en arbaro infan-tendaro kun ekzercoj pri Esperanto. 200 infanoj el 4 landoj tiel lernis nian lingvon dum 10 tagoj sub la gvidado de spertaj instruistoj.»*

A.- Se ĉio tio vin interesas, informiĝu pri la naturamika renkontiĝo en Abaliget. Vi povas skribi al nia kurtonda servo de Svisa Radio.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. La venontan semajnon ni daŭrigos nian babiladon kun niaj geaŭdantoj post aŭdigo de la promesita registraĵo pri komputera lingvistiko. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!